



# TEA-BULTENO

21<sup>A</sup> JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO

N. 9-10/2018

La destino de popolo dependas de la reguloj de ĝia gramatiko. Ne ekzistas granda lando se ĝi ne havas precizecon de esprimiĝo.  
*Ferdinand Pessoa, portugala verkisto (1888-1925)*

## Somerumi Esperante! Memoroj el mia taglibreto

Infera somero, arda, suna, senpluva, bruliga!  
"Duone de julio - temperaturo 30-grada: ho, vere neelteneble! Bonŝance ke baldaŭ mi iros al Portugalio, al la lando prilavata de la Atlantikaj ondoj, kie bela briza milda vento refreŝigos min, dum mia konatiĝo kun la Luzitana teritorio."

La unua parto de la vojaĝo - al Batalha, Coimbra, Porto - fakte ŝajnis la realigo de miaj revoj, ne nur rilate veteron: **Monaĥejo de Batalha** - Ĝi impone majestas arkitekture, ekzemplas la plej originalan portugalan stilon. Eksterordinara miksaĵo de la flama kaj perpendikla gotikoj<sup>1)</sup>, sen sonorilejoj; en 1983 ĝi eniris la liston de la Mondaj Heredaĵoj de UNESKO.



**Coimbra** - sidejo de unu el la plej antikvaj universitatoj de la okcidenta mondo (1290). Apud ĝi la fascina biblioteko Joanina, barokstila, en kiu konserviĝas ĉ. 250 000 volumoj, pritraktantaj medicinon, geografion, historion, humanismajn disciplinojn, filozofion, teologion, sciencojn k.a. Kuriozaĵo: tuta armeo da vespertoj protektadas la altvalorajn librojn. Kiel tio povas esti, sen ricevo de domaĝoj? Ĉiuvespere la gardistoj etendas sur la tablojn kovrilojn el ledo, por ke la vespertoj, flugante tien kaj reen tra la salonoj, ne malpurigu ilin per siaj fekaĵoj. La bestetoj eniĝas tra etaj muraj aperturoj, ĉar ilia tasko konsistas en



manĝado de insektoj, kiuj detruas la antikvajn librojn.

Restas bone fiksitaj en la menso la bildoj pri la domoj, farbitaj per vivecaj koloroj; pri la internoj de la preĝejoj, riĉegaj je netakseble valoraj pentraĵoj kaj skulptaĵoj, kaj je oraj ornamaĵoj ĉirkaŭ la altaroj, kio aludas al la grandpovo de la katolika eklezio kaj la apogo donita de la diversaj reĝdinastioj; pri la eleganteco de la nobelaj rezidejoj florstilaj.



Tiaj belegaĵoj iom kontrastas kun la malnova parto de la urbo, kies stratoj krutaj kaj mallarĝaj tamen allogas kaj ravas pro sia specifejo.

**Porto** - la norda ĉefurbo, muzeo subĉiela de azuleĵoj, la mondkonataj kaheloj emajlitaj kaj ornamitaj per bildoj, kun arego da mirindaj vidindaĵoj. Ne eblas rakonti per kelkaj vortoj, kia trezorujo malkaŝiĝis antaŭ miaj okuloj. Imponas denove la internaj kaj eksteraj grandiozo kaj soleo de la religiaj konstruaĵoj, ĉarmas la delikataj dekoracioj de la novstilaj palacoj, allogas la malnovaj librejoj kaj vendejoj, surprizas plaĉe la eviden-





ta zorgemo pri ĉieaj pureco, renovigado, plibonigado kaj ĉefe konservado de la malnovo.

Kaj nun... al **Lisbono**, la UK-sidejo! Vere mi ne scias, kio plej impresis min: ĉu la kongresaj eventoj aŭ la urbo mem?

Decidite: ni ne perdu tempon, ek al atak' de la portugala ĉefurbo! Tre naiva tiu ideo, ĉar tuj evidentiĝas, ke tio ĉi ne eblas, tute ne! Lisbono ne estas inda je nur supraĵa kaj hasta vizito: oni devas alpreni sufiĉan tempon por ĝin frandi, malrapide, gustumante peceton post peceto por konservi la ĝustan memoron, ankaŭ por plene mergiĝi en la lokan etoson, kaj ĝui la kolorojn, la aromojn, la spiriton kaj lingvon de la lokanoj.

Tro abundas la vidindaĵoj: palacoj blankegaj imponantaj en larĝegaj stratoj, arkaĵoj grandiozaj, placoj vastegaj, unu el kiuj rigardanta al rivero Taĵo, monumentoj dediĉe al herooj, reĝoj, historiaj eminentuloj; monaĥejoj kaj preĝejoj, kies internoj estas nepriskribeblaj; kaj tramoj, liftoj, turoj...



Kiel ofte okazintis, mi sukcesas trovi ankaŭ en Lisbono ion rilatan al mia Triesto. Monumento alta, svelta, kun, je ties lbazo, kvar belaj virinaj statuoj, troviĝas en Placo Dom Pedro Kvara, konata kiel *Rossio*. Memkompreneble sur ĝia pinto estas statuoj, la bronza statuoj de Dom Pedro Kvara. Ĉu efektive temas pri la portugala reĝo aŭ la franca skulptisto, taskigita realigi la statuon, sendis anstataŭe tiun, jam pretan, de Maksimiliano Unua, imperiestro de Meksiko, tie pafmortigita? Onidiroj rakontas, ke pro simileco de la du eminentuloj li kapablis readapti la jam pretan statuon de Maksimiliano kaj ĝin liveri al mendintoj anstataŭ pretigi tute novan pri Dom Pedro. Cu vero ĉu malvero? Mi ne scias: tion ĉi mi trovis skribita en la gvidlibro pri Portugalio - al vi, laŭ via prefero, la decido.

Sed ni ekiru al la UK, la 103<sup>a</sup> UK de Esperanto, la unua UK okazinta en Portugalio. Trafa la

kongresa temo "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?" pridiskutita reĝisore de Javier Alcalde, specialisto pri historio de Esperanto kaj ĉefe rilate al la pacaj klopodoj kaj al la esperanta agado dum milito, inkluzive de la hispana intercivitana milito kaj de la dua mondmilito. Arego da prelegoj, okazantaj dum la Kleriga Lundo, prilumas pri multaj aktualaĵoj, distribuante multajn konsilojn realigeblajn en agada, informa kaj kleriga kampoj (tia fakte estas la intenco de tiu ĉi serio da etaj seminarioj). Mi partoprenis i.a. en la "Arto paroli publike", zorge de H. Tonkin: tre interesa parolado, kiu fine decidigis min, ke mem neniam mi alfrontos tian defion.

Kredeble unu el la plej vizitataj programeroj estis la tradicia "aŭkcio", kiu donas la eblon donaci, en amuza maniero, monon al la UEA-projekto rilata al Duolingo. Gratulojn al finna s-ino, ricevinta la kongresnumeron 1, por la venontjara UK en Lahtio, kontraŭ la "modesta sumo" de pli ol 600 eŭroj!

Ĉijare kunvenis en varma salono la Esperanto-Ligo Filatelista, kies prezidanto mi estas, kiun ĉeestis 40-50 personoj: pri tiel signifplena nombro mi tre fieras - eble reaktualiĝas la temo E-filatelado kaj Esperantaĵ-kolektado. Tial la estraro de ELF-AREK povas ekhavi esperon je pli brila estonteco.


Ĉiuvespere (sed ankaŭ en aliaj horoj de la tago, precipe posttagmeze) okazis bonegaj koncertoj, krome la kutimaj nacia kaj internacia vesperoj, fare de konataj kaj ne tiom konataj artistoj: envere ĉiuj estis spektindaj kaj tial laŭdindas la zorgantoj pri la artaj programoj.

Ŝajnas al mi, ke mia raporto baldaŭ transformiĝos al novelo, tial tie ĉi mi afiŝas la vorton "**fino**", ĉar la parolon mi deziras transdoni al tre konata esperantisto el Kubo, kiu, dum la internacia vespero, deklamis siajn surpaperigitajn pensojn. Mi havas nenian embarason konfesi, ke larmoj eliĝis el miaj okuloj, dum la aŭskultado de tiel simplaj vortoj kun enhavo grandioza: tiuj vortoj - mi kredas - eniris rekte ĉies koron kaj meditigis nin ĉiujn, precipe kiam en krizaj momentoj oni sin ekdemandas: "Nu, kial mi daŭre estas Esperantisto?"

Noto <sup>1)</sup> Flamstilo aŭ *flamboyant* estas la fina fazo de la gotika stilo; perpendikla gotiko komenciĝis en Anglujo.

## Mia Esperantujo

Mia esperantujo estas la detaloj, kiujn mi ne preteratentas, por ke la movado pli kaj pli evoluu kaj fruktojn donu kaj por ke kresku en niaj membroj sento de aparteno...



Mia esperantujo estas la faktoj, kiujn mi produktas kaj kreas, por ke nia lingvo estu pli sencohava kaj konvinkoveka...

Mia esperantujo estas la aranĝoj kiujn mi partoprenas por doni kaj ricevi, por lerni pri historio kaj kulturo de mia eta lando, por kundividi spertojn kaj por nutri mian esperantist-econ kaj animon...

Mia esperantujo estas miaj oftaj kontaktoj kun esperantaj libroj kaj alispecaj materialoj, kiuj igas min pli kompetenta kaj klera kaj faras mian verdan vivon prospera...

Mia esperantujo estas miaj ĉiutagaj etaj kontribuoj al la asocio kaj al la monda komunumo, ĉu varbante, ĉu parolante kun novuloj, ĉu verkante, ĉu esplorante, ĉu respondante leterojn, ĉu gastigante samideanojn, ĉu ĉiĉeronante vizitantojn, ĉu akceptante diferencojn de la aliaj, ĉu helpante ĉiujn diversmaniere...

Mia esperantujo estas la amikeco, kiun mi konstruas, kiu igas min senti hejme kaj pli homa, pli gaja kaj feliĉa aliloke, alilande...

Mia esperantujo estas mia bona kaj malbona uzado de la akuzativo, mia nekomprenejo de korelativaj vortoj, miaj ludoj per prefiksoj kaj sufiksoj, miaj timoj paroli, mia kuraĝo deklami, miaj ĝuoj kunkanti, nia libroservo, nia biblioteko...

Mia esperantujo estas mi, vi, ŝi, li kaj la aliaj, ni duope, trio, kvarope, okope, dekope, kaj pliope, kiuj Esperante klubas, interparolas, praktikas kaj eĉ geedziĝas...

Mia esperantujo estas miaj trajtoj kaj viaj trajtoj kaj la pontoj kreaĵoj de ni por ke nia lingvo

vo iru antaŭen...

Mia esperantujo estas kiel mi subordigas kelkajn miajn ŝatojn kaj preferojn por la bono kaj prospero de la grupo, de la kolektivo, de la rondo familia, de la asocio, de la komuna ideo...

Mia esperantujo estas la pioniroj kaj nepioniroj, kiuj daŭre kreas esperantistajn valorojn por ke niaj celoj estu pli plenumebaj, aŭdeblaj kaj kompreneblaj de eksteruloj kaj por ke niaj idoj sentu sin pli dankemaj kaj fieraj pri ni...

Mia esperantujo estas niaj aranĝoj, niaj renkontiĝoj, niaj kongresoj, niaj deziroj ke Esperanto progresu kaj estu pli komprenebla ideo de ĉiuj...

Mia esperantujo estas via kaj mia Zamenhof, via kaj mia flago, via kaj mia himno, viaj kaj miaj simboloj, viaj kaj miaj pioniroj kaj elstaruloj...

Mia esperantujo estas vi, li, ŝi, ni, ili kaj mi. Niaj virtoj kaj malvirtoj, niaj klopodoj kaj atingoj, nia lingvo, nia lingvo, nia lingvo.

Mia esperantujo estas, Mi estas Esperanto, Mi estas Esperanto, Mi estas Esperanto.

*Julían Hernández Angulo*

Dankon al vi, Julio! Vi elstare voĉon donis al miaj kaj niaj sentoj!

Elda



## Rigojancsi - La origina hungara recepto

Antaŭ ĉ. du monatoj sin enŝovis en mian retan poŝtkeston iu stranga mesaĝo, en kiu legeblis, ke estas je dispono informoj pri "rigojancsi" kaj ke ĉiam eblas ĝin gustumi en Triesto. "Nu, verŝajne temas pri bongustaĵo, ĉu dolĉa ĉu sala" - mi pensis, tial elpreninte el la breto kelkajn librojn pri triesta gastronomio, ilin rapide mi trafolumis por ekscii, pri kio temas. Agrabla surprizo! Eĉ en du diversaŭtoraj kuirlibroj troviĝis la recepto de... torto.

En "Triestaj dolĉaĵoj" aŭtorita de la plej fidinda kaj sperta gastronomo, membro de la Akademio pri Itala Kuir-

arto, Mady Fast, la nomo de tiu torto aperas kiel "Rigojancsi". Jen, antaŭ ol malkaŝi la recepton kaj tenti vin pruvian lertecon kuiristan, mi iom detaligas la historion de ĉi malnovtradicia kuko, bedaŭrinde nuntempe ne tiom multe konata. La ĉefrolanto de tiu ĉi historio estas la amo.

Ĉio komenciĝas en Detroit, Usono, naskiĝloko de Klara Marie Ward, filino de milionula industriisto en la fera kaj ŝtala sektoroj, proprietulo de arĝentaj minejoj k.a., Eber Brok Ward. La belega Klara, nur dek-

sesjara, enamiĝas al la belga princo Joseph de Caraman-Chimay kaj translokiĝas al Belgio. La nupto, konsiderita la jarcenta evento, okazas en 1890 en Parizo: ŝi ĉarmega kaj riĉega, li brila kaj nobela, kvankam pli maljuna ol ŝi je 15 jaroj. Fakte tiu geedziĝo fariĝis iaspeca simbolo: renkontiĝo de riĉeco Nov-Monda kun la antikva eŭropa aristokrateco.

El ilia kuniĝo naskiĝis du gefiloj. Sed ĉio ĉi ne estis sufiĉe kontentiga por ŝi. Klara ne kapablis adaptiĝi al sia nova vivo, tial pli kaj pli longe, pli kaj pli ofte, ŝi enloĝiĝis en la ĉefurbo franca, kie mondumado en la elita societo estis ŝia preferata ŝatokupo, plus konstanta ĉeesto en la



plej famaj spektaklejoj kaj modaj restoracioj parizaj.

Tiutempe en la la franca ĉefurbo sin prezentadis unu el la plej famaj violonistoj tiutempaj, la hungara cigano Rigò Jancsi, aventurema artisto kun eksterordinara talento. Laŭdire la



princino tuj enamiĝis al li: la fascina cigano konkeris la koron de la bela princino, kiu forlasis sian edzon por li. Estis la jaro 1896. Imagu, kiom da bruo tiu okazaĵo kaŭzis. Ĵurnaloj, grandkaj dik-titole, malice 'romanumis' pri la skandalo (maje 1896 - eĉ en la triesta tagĵurnalo *IL PICCOLO* aperis artikolo pri ĉi historio!), klaĉadoj en ĉiuj elegantaj salonoj

abundis, kritikoj malpurigis tiun amhistorion. Ili kune fuĝis en Hungarion, kie ili geedziĝis en la jaro 1898.

La eksprincino Klara Caraman-Chimay mem iĝis artistino kaj rolis kiel varietea stelulino en la parizaj kabaredoj. Oni diras, ke ŝi eĉ prezentigis antaŭ la publiko ankaŭ en la misfama *Moulin Rouge*. Tamen tiu amidilio ne havis longan vivon: manko de mono kaj malfideleco de Jancsi kaŭzis la disiĝon de la paro. Tion ĉi sekvas tute banala vivhistorio: supozeble ŝi serĉadis poste vane la "veran" amon, sed sensukcese. Ŝi reedziĝis kun iu hispano - *Peppino Ricciardo* - plej probable italo, eble kelnero renkontinta surtrajne. Pli poste divorco kaj denova edziniĝo: laŭ onidiroj, temis pri staciestro de malgranda itala fervojo, apud Vezuvo. Li estis la kvara kaj lasta edzo.

Klara mortis en Padovo, je la 9<sup>a</sup> de decembro 1916, 43-jara. Mallonga vivo, mallongaj feliĉaj momentoj, probable: restis tamen dolĉa memoraĵo pri ŝi - la bongustega torto *Rigojancsi*.

En Hungario, eble en la budapeŝta hotelo Nemzeti Szálló, Rigò Jancsi kun la helpo de amiko-kukisto elpensis tiun faman kukon por surprizi sian amatinon. La torto tuj ekhavis brilan sukceson kaj ĝiaj famo kaj recepto vojaĝis de Budapeŝto al Vieno, kaj de tie ankaŭ al Triesto.

INGREDIENCIOJ:	PREPARADO:
<p><b>POR LA SPONGOKUKO</b></p> <p>8 ovoj</p> <p>160 g da sukerpulvoro</p> <p>160 g da faruno</p> <p>40 g da kakaopulvoro</p> <p><b>POR LA KREMAĴO</b></p> <p>100 g da sukerpulvoro</p> <p>80 g da kakaopulvoro</p> <p>10 g da gelatenaĵo</p> <p>6 dc da laktokremo</p> <p>100 g da fandoĉokolado</p>	<p>Aldonu al la sukerpulvoro la kakaon. Disigu la ovoflavojn de la blankoj. Aldonu al la unuaj la sukerkaj kakao-pulvorojn kaj longe kirlu ĝis la kunmetaĵo pufiĝos kaj fariĝos ŝaŭmeca. Kirladu nun la ovoblankojn kaj kunmetu la du preparitaĵojn, miksante ilin tre delikate. Aldonu nun - kulero post kulero - la kribritan farunon. Kiam ĉio ĉi pretos, buterumu kvadratorman tortujon, varmigu la fornon ĝis 180° kaj baku ĝin dum ĉ. 30-35 minutoj. Poste atendu ĝis kiam la torto malvarmiĝos. Kiam ĝi estos komplete malvarma, tranĉu ĝin laŭ duono kaj la supran parton kovru per ĉokolada glazuro. Kiam la glazuro estos solida, tranĉu je kvadratetoj 4x4-centimetraj. Je ĉi punkto preparu la kremaĵon: pufigu la laktokremon, aldonu la sukerkaj kakao-pulvorojn kaj la gelatenaĵon, antaŭe diluita en iom da akvo. Surŝutu la alian parton de la kuko per tiu kunmetaĵo kaj fine kovru ĝin per la kvadratetoj. Tio ĉi helpas en la disdivida tranĉado. Per tranĉilo, iom malsekigita en varma akvo, dispecigu la torton kaj ĝin servu al familianoj, amikoj, gastoj: bonan frandadon kaj bonan sukceson al la kukisto!</p>



### 3<sup>a</sup> MEMORIALO "LUCIJA BORČIĆ"

Zagrebo, Kroatio, 12.-15.11.2018

Lundo, 12<sup>a</sup> de novembro

- Simpozio "Tradukado de literaturo": prelegoj

- Koncerto

Mardo, 13<sup>a</sup> de novembro

- Simpozio "Tradukado de literaturo": prelegoj

- Faka vizito

- Multlingva poezi-vespero

Merkredo, 14<sup>a</sup> de novembro

- ronda tablo "Tradukita E-literaturo: ponto inter la kulturoj"

- surmeto de floroj ĉe la tombo de Lucija Borĉić

- Prezento de ŝia verkaro

- Proklamo de la rezultoj de la 2<sup>a</sup> Internacia traduk-konkurso "LUCIJA BORČIĆ"

Ĵaŭdo, 15<sup>a</sup> de septembro

- Vizito al urbo

- Vizito al la 41<sup>a</sup> Internacia libro-foiro INTERLIBER (Zagreba Foiro)

Aliĝkotizo: 15 eŭroj

Diversaj loĝeblecoj (jam de 15 eŭroj tage)

Aparta avantaĝo por programkontribuantoj!

Organizanto: Kroata Esperantista Unuiĝo

Informoj: [hes@hes-keu.hr](mailto:hes@hes-keu.hr)/[www.hes-keu.hr](http://www.hes-keu.hr)

aliĝilo elektronika: [goo.gl/TZ9BSq](http://goo.gl/TZ9BSq)

# Plasto kaj maro en Italio

3a kaj lasta parto

## Baldaŭ novaj leĝoj!

Okaze de la ok-foja kunveno de "Mediterraneo remenda", nacia kampanjo por la konservado kaj protektado de *Mare nostrum* (Maro nia), en junio ĉi-jara, la itala ministro pri Medio, Sergio Costa, certigis ke oni alprenos severajn rimedojn por antaŭeviti -kaj malpliigi- kolizion de plasto kun la homa sano kaj ekosistemoj.

Tutunue oni intencas haltigi la utiligadon de ĉiaj plastaj ujoj en ĉiuj publikaj oficejoj, krom malpermesi la komercadon de serio da tiaj artikloj, malpliigi la uzadon de ujoj por manĝaĵoj kaj trinkaĵoj



oj "uzu kaj forĵetu", plivastigi la utiligadon de redonendaj ujoj kaj, fine, interveni en la fiŝkaptado sektoro. Intenco de la ministro estas prezenti la koncernajn leĝajn proponojn antaŭ la somerfino.

La ĵus proponita EU-direktivo celas limigi la uzadon - flanke de konsumantoj - de plastaj ujoj "unu-nur-uzaj", kiaj manĝilaro, teleroj, suĉoŝalmoj kaj kirliloj por trinkaĵoj. Aliaj produktoj (sorbovatoj, malsekaj tuketoj kaj balonetoj) estos surmerkataj, nur se havantaj etiketon indikantan la ĝustan manieron ilin forigi, la damaĝojn konsekvencajn al maltaŭga eliminado kaj informojn pri ilia plasta konsisto.

Kaj nun demando al la ministro: kiaj estos la naciaj tiurilataj dispozicioj? Tutunue oni komencos per malpliigo de la ujoj "uzu kaj forĵetu": tio signifos leviĝon de monpunoj por entreprenoj kaj konsumantoj se oni ne priatentos tiun indikon. Bedaŭrinda estas la konstato, ke Italio estas unu el la ĉefaj eŭropaj produktantoj de plasta manĝilaro (teleroj, glasoj, kuleroj, forketoj...) forĵetenda post uzado. El tiuj estas vendataj ĉ. 115 000 tunoj jare. Kuriozaĝo geografia: en Sicilio oni utiligas pli altan kvanton da manĝilaro, ol en Ligurio, Aosta Valo, Piemonto kaj Lombardio, kune.

Eta problemo tamen prezentigis antaŭ tiu signifa projekto: oni devas eltrovi novajn solvojn, precipe pri tio kio rilatas al la plastaj ujoj aŭ la aĵoj mem - ne facilas elpensi taŭgajn ujojn por nutraĵoj, sekve oni multon devos investi en la esplorado. Aldone ne simplas trovi la ĝustajn materiajn substancojn adaptajn por ujoj kiu entenos la plej diversajn nutraĵojn.

Okaze de la ok-foja kunveno de "Mediterraneo remenda", nacia kampanjo por la konservado kaj protektado de *Mare nostrum* (Maro nia), en junio ĉi-jara, la itala ministro pri Medio, Sergio Costa, certigis ke oni alprenos severajn rimedojn por antaŭeviti -kaj malpliigi- kolizion de plasto kun la homa sano kaj ekosistemoj.

Tutunue oni intencas haltigi la utiligadon de ĉiaj plastaj ujoj en ĉiuj publikaj oficejoj, krom malpermesi la komercadon de serio da tiaj artikloj, malpliigi la uzadon de ujoj por manĝaĵoj kaj trinkaĵoj "uzu kaj forĵetu", plivastigi la utiligadon de redonendaj ujoj kaj, fine, interveni en la fiŝkaptado sektoro. Intenco de la ministro estas prezenti la koncernajn leĝajn proponojn antaŭ la somerfino.

Okaze de la ok-foja kunveno de "Mediterraneo remenda", nacia kampanjo por la konservado kaj protektado de *Mare nostrum* (Maro nia), en junio ĉi-jara, la itala ministro pri Medio, Sergio Costa, certigis ke oni alprenos severajn rimedojn por antaŭeviti -kaj malpliigi- kolizion de plasto kun la homa sano kaj ekosistemoj.

Tutunue oni intencas haltigi la utiligadon de ĉiaj plastaj ujoj en ĉiuj publikaj oficejoj, krom malpermesi la komercadon de serio da tiaj artikloj, malpliigi la uzadon de ujoj por manĝaĵoj kaj trinkaĵoj "uzu kaj forĵetu", plivastigi la utiligadon de redonendaj ujoj kaj, fine, interveni en la fiŝkaptado sektoro. Intenco de la ministro estas prezenti la koncernajn leĝajn proponojn antaŭ la somerfino.

Al tiuj ĉi novaĵoj aldoniĝas kromaj, tre interesaj: ekde kelkaj monatoj (finfine!) estas uzablaj la biomalkombineblaj aĉetsak(et)oj por legomoj kaj pakaĵoj, kaj baldaŭ, ekde 2020, estos malpermesite en Italio enmerkati kosmetikajn produktojn enhavantajn mikroplastojn; fine, venontjare, la vataj orel-bastonetoj estos malpermesataj se la tenilo estos plasta.

Alia kuriozaĝo: je loka nivelo unuopaj ĉemarbordaj komunumoj jam aktiviĝis por protekti la maron kontraŭ poluado plasta. Ekzemple, la urbestro en la insulo Lampeduzo decidis entute malpermesi la vendadon kaj utiligadon de plastaj teleroj, glasoj, manĝilaro, inkluzive de plastaj aĉetsaketoj. Kaj ĉio ĉi ekvalidos de la 31<sup>a</sup> de aŭgusto ĉj. Gratulojn al li! Tiu elekto estis tuj sekvita en la insuloj *Tremi* kaj *Linosa*.

Do, io ekmoviĝas ankaŭ en Italio! Espereble oni daŭrigos laŭ tiu vojo kaj ne limiĝos je tiu laŭta, promesoplana babilado por gajni voĉojn: *jam temp' està* ne perdi *tempon* - oni suprenfaldu la manikojn kaj konkrete ekagu! Ne nur instancoj, ministerioj, registraro k.s.: ĉiuj civitanoj devas engaĝiĝi strebe kaj streĉe por klopodi konservi en kiel eble plej bona stato nian mondon, kiun ni transdonos al la ontaj generacioj! Ni klopodu ripari la damaĝojn faritajn, aŭ se tio ne plu plenumblas, almenaŭ ni ne plue ĝin detruu! La nepoj nin benos!



Tradukis EIDO  il fatto alimentare

## UEA INVITAS AL KUNFESTADO DE LA EŬROPA TAGO DE LA LINGVOJ

Ekde 2001, la Konsilio de Eŭropo kaj ĝiaj 47 membroŝtatoj festas, la **26<sup>an</sup> de septembro**, la Eŭropan Tagon de Lingvoj, kies ĝeneralaj celoj estas:

\* Informi la ĝeneralan publikon pri la graveco de lingvolernado, subtene al multlingvismo kaj interkultura interkompreniĝo;

\*\* Diskonigi, protekti kaj stimuli lingvan kaj kulturan diversecon en Eŭropo;

\*\*\* Kuraĝigi lingvolernadon dum la tuta vivo, en la lernejo kaj ekster ĝi, pro studkialoj, profesiaj bezonoj, moviĝaj celoj aŭ simple pro persona ĝuo.

UEA invitas esperantistojn, kaj aparte esperantistojn en Eŭropo, kunfesti la Eŭropan Tagon de Lingvoj per la jenaj paŝoj:

\* Informiĝi pri ETL ĉe la retpaĝo de Konsilio de Eŭropo ([edl.ecml.at/](http://edl.ecml.at/)), kie troveblas detaloj en 38 lingvoj;

\* Okazigi eventon la **26<sup>an</sup> de septembro**;

\* Registri evento(j)n ĉe: [edl.ecml.at/Events/EventsDatabase/tabid/1772/ctl/Edit/mid/3439/Default.aspx](http://edl.ecml.at/Events/EventsDatabase/tabid/1772/ctl/Edit/mid/3439/Default.aspx)

Aparte bonvenas eventoj kaj kontribuoj (kaj je individua kaj je organiza nivelo) kiuj enkadriĝas en la ĝeneralaj celoj de la iniciato: subteno al dumviva lingvolernado, al lingva kaj kultura diverseco kaj, pli ĝenerale, al interkultura interkompreniĝo kaj faciligo de la rilatoj

inter diversaj popoloj, plene kongrue kun la celoj de UEA.

Gravas poste diskonigi la okazigitajn eventojn, tiel ke la diversaj iniciatoj povu esti inspiro kaj modelo por aliaj. La celo estas taŭga videbligo de Esperanto kiel ponto inter diversaj kulturoj kaj lingvoj, kaj de esperantistoj kiel kreemaj kaj profesinivelaj aktivuloj, aparte sentemaj pri plialtigo de interkultura interkompreniĝo.

Okaze de diskonigo de planoj kaj eventoj per Vizaĝlibro aŭ Tvitro, bv. uzi la kradvortojn

\* #europatagodelingvoj, \* #ETL,  
\* #europeandayoflanguages, \* #EDL,  
\* #esperanto,

\* #JourneeEuropeennesdesLangues.

La Ĝenerala Sekretario kaj estrarano de UEA pri Landa Agado en Eŭropo, Aleks Kadar, disponeblas ricevi kaj komenti ideojn, proponojn, raportojn; bv. sendi ilin al [alekska@gmail.com](mailto:alekska@gmail.com).

Krome, per tiu ĉi komuniko, UEA kaptas ankaŭ la ŝancon memorigi aparte al eŭropuniaj esperantistoj reagi al la publika konsultado pri lingvoj, lanĉita de la Eŭropa *Ombudsmano* pri multlingva politiko en EU. Bonvolu informiĝi kaj orientiĝi pri la rekomenditaj respondoj, legante la jenan komunikon, dissenditan la 29<sup>an</sup> de aŭgusto 2018: [uea.org/aktuale/komunikoj/2018/UEA-alkokas-partopreni-en-EU-enketo-pri-multlingveco](http://uea.org/aktuale/komunikoj/2018/UEA-alkokas-partopreni-en-EU-enketo-pri-multlingveco).

Informiĝu, okazigu eventojn, kaj kunfestu la Eŭropan Tagon de Lingvoj!

[El Gazetaraj Komunikoj de UEA - N. 754](#)

Septembra Programo	
7a, vendredo	20h00 - Bonvenon al ĉiuj!
9a, dimanĉo	<b>Festo de Amikeco sur Monto Forno - Surpinte je la 12a horo</b>
11a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
14a, vendredo	20h00 - Pri E-to en la reto!
18a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
21a, vendredo	20h00 - 85a Itala Kongreso en San Marino
25a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
28a, vendredo	20h00 - <b>EŬROPA TAGO DE LA LINGVOJ</b>

### Aforismo

Homo sen revoj, sen utopioj, sen idealoj, estas monstra besto, apro diplomita pri pura matematiko.

*Fabrizio de André, kantaŭtoro, poeto (1940-1999)*  
Naŭdek procentoj el la politikistoj domaĝas la reputacion de la ceteraj dek.

*Henry Kissinger (1927-2002)*

Oktobra Programo	
2a, mardo	17h30 - Prezento de la unuagrada kurso okt '18/majo '19
5a, vendredo	20h00 - Legado de artikoloj en la revuoj <b>ESPERANTO</b> de UEA
9a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
12a, vendredo	20h00 - Legado de libro
16a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
19a, vendredo	20h00 - Vojaĝo tra Portugalio okaze de la 103 <sup>a</sup> Universala Kongreso en Lisbono
23a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
26a, vendredo	20h00 - Ĉu ni krucvortumu?
30a, mardo	18h00 - Duagrada kurso

**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**  
**Redaktanto:** Elda DOERFLER - [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)  
**Sidejo/Poŝta adreso:** Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste  
**Kunventagoj:** marde 18-20; vendrede 19-21  
**Tel:** (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936  
**Banka Konto:** Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439  
**Reto:** [esperantotrieste@gmail.com](mailto:esperantotrieste@gmail.com); [nored@tiscali.it](mailto:nored@tiscali.it)  
**Asociaj ttt-ejoj:** [www.esperantotrieste.altervista.org](http://www.esperantotrieste.altervista.org);  
[www.tea1906.altervista.org](http://www.tea1906.altervista.org); [www.karstajtagoj.altervista.org](http://www.karstajtagoj.altervista.org)